| **Verboj netransitivaj** | | **Verboj transitivaj** | |
|---|---|---|---|
| Verboj unu-valentaj → | Verboj unu-valentaj | Verboj du-valentaj | Verboj tri-valentaj |
| **-iĝas -o = ek-as -o** | **-as -o** | **-o -igas -on** | |
| Varmiĝas la akvo.<br>(= Ekvarmas la akvo.) | Varmas la akvo.<br>(= La akvo estas varma.) | Ŝi varmigas la akvon. | |
| Sidiĝas la promenantoj.<br>(= Eksidas la promenantoj.) | Sidas la promenantoj. | La promenantoj sidigas sin.<br>Laciĝo sidigas la promenantojn. | |
| Estiĝis kafo-paŭzo.<br>(= Ekestis kafo-paŭzo.) | Estas kafo-paŭzo. | Oni estigis kafo-paŭzon. | |
| Mankiĝas pano.<br>(= Ekmankas pano.) | Mankas pano. | Troa manĝemo de la gastoj mankigas panon. | |
| | **-iĝas -o.** | **-o -as -on** | **-o -igas -on al -o** |
| | Manĝiĝis pomoj. | La infanoj manĝis pomojn. | La patrino manĝigis pomojn al siaj infanoj. |
| | Aĉetiĝis ĉiuj biletoj. | La publiko aĉetis ĉiujn biletojn. | Reklamo aĉetigis ĉiujn biletojn al la publiko. |
| | Karlo naskiĝis sur monto. | Karlon naskis lia patrino sur monto. | Falo de lia patrino naskigis Karlon sur monto. |
| | Aŭdiĝis birdokantoj. | La promenantoj aŭdis birdokantojn. | La gvidisto aŭdigis birdokantojn al la promenantoj. |